IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 56 - trimonata
2026/3

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Alessandra Madella
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Julián Hernández Angulo
Marija Belošević
Petro Chrdle
Piet Glorieux
Mireille Grosjean
Jia Rongxia
Lee Jungkee
Kitagawa Ikuko
Aranka Laslo
Alessandra Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Aimé Patrick Manirakiza
Vicente Manzano-Arrondo
Mariana Pitar
A. Giridhar Rao
Spomenka Štimec
Tan Zhongqi



Probal Dasgupta (1953-2026)

ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
Probal Dasgupta (1953-2026) (RAO, ŠTIMEC, MAMDUHI) 4
Alessandra MADELLA: *Raporto pri la 59-a Kongreso […]* 8
Impresoj pri la 59-a Kongreso […] (MANIRAKIZA, TAN, GLORIEUX, JIA, PITAR) 13
LEE Jungkee: *Kial Seula Esperanto-Kulturcentro ekzistas?* 17
KITAGAWA Ikuko: *Instruado de Esperanto de JEI* 20
Vicente MANZANO-ARRONDO: *Instrui E-on laŭ la metalingvistika kompetento* 23
El la landoj kaj sekcioj (IT, CU, RS) 26
Tago de Lernado (Marija BELOŠEVIĆ) 29
Kial oni malavare subtenas ILEI? (Ahmad Reza MAMDUHI) 31
Petro CHRDLE: *Sperto pri efika instruado de triaaĝuloj […]* 33
Mireille: GROSJEAN: *Kio estas tutmonda civitaneco?* 36
Informoj pri ILEI kaj IPR 37

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio. Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, Via Montanara Sud 91a IT-46010 Campitello (Mantova) Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Ul. Bočačka 25, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, R. S. Francisco Xavier, 681, bl E, ap 201, Maracanã - cep: 20550-011, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj.

Estrarano: Aimé-Patrick MANIRAKIZA, Buhomba 7 Nr 39, Maramvya, Bujumbura, Burundo, Tel. +25779813485 (Whatsapp, Telegramo), <*apmanirakiza@gmail.com*>. Agado pri Afriko, observanto ĉe TEJO.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford
***Membroj*:**
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu
Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]
A. Giridhar Rao, Barato, emerita profesoro, Fakultato pri edukado, Azim Premji University, Bengaluro; AdE[1]
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Titolpaĝe: Probal Dasgupta fotita de Nina Danylyuk dum internacia E-a evento en Francio Pri lia forpaso legu niajn rememorojn vortojn sur p. 4-8.

Dorskovrile supre: gratula tabulo al Zaozhuang-a Universitato kiel centro de instruado kaj esplorado de Esperanto; **malsupre**: grupo de kongresanoj antaŭ la Muzeo de Mozi dum la 59-a Kongreso de ILEI. (vd. p. 8-13.)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Kun ĉi tiu numero de IPR ni rememoras unu el la plej elstaraj figuroj de la Eo-movado: Probal Dasgupta, lingvisto, intelektulo, pedagogo kaj amiko de multaj el ni. Lia vivo kaj laboro estis profunde ligitaj al lingva justeco, plurlingvismo, interkultura dialogo kaj la demando, kiel lingvoj povas kontribui al pli justa mondo. En ĉi tiu numero ni trovas plurajn tekstojn, kiuj prezentas diversajn flankojn de lia riĉa personeco kaj heredaĵo.

Granda parto de ĉi tiu numero estas dediĉita al la 59-a Kongreso kaj la Simpozio de ILEI, okazintaj en julio ĉe Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio. La kongreso kunigis instruistojn, esploristojn kaj aktivulojn el multaj landoj, dum la simpozio kreis riĉan dialogon inter esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj pri lingvolernado, plurlingvismo, interkultura kompetento kaj lingva konscio. La raportoj kaj impresoj en ĉi tiu numero donas ideon pri la diverseco kaj klereco de tiuj renkontiĝoj.

Ni aparte ĝojas ankaŭ prezenti la imponajn edukajn kaj kulturajn agadojn de la Japana Esperanto-Instituto kaj la japana Esperanto-movado: de lokaj kaj universitataj kursoj ĝis ekzamenoj, junularaj iniciatoj, kunlaboro por plurlingva edukado kaj novaj manieroj prezenti Esperanton al la ekstera publiko – i.a. per komputilaj ludoj al junuloj.

Ni esperas, ke ĉi tiu numero inspiros vin, same kiel ĝi memorigas nin pri la riĉeco de nia internacia komunumo.

Bonan legadon!


Ahmad Reza MAMDUHI,
Prezidanto de ILEI

Probal Dasgupta (1953-2026)

A. Giridhar RAO:

Mi ĉi-pere lanĉas la komiksan rolulon Akuzazeno. Ĝi portas kiel ŝarĝon la animojn de prepozicioj! Iliajn korpojn ĝi per azena magio konvertas al akuzativo. – Probal Dasgupta, „Mi akuzativas...!” *La Ondo de Esperanto*, 2026, n-ro 2.

Jen tipa stilo de Probal Dasgupta – nerekta, vortludema, kaj ofte kapgratiga! Forpasis tiu eminenta lingvisto kaj intelektulo, la 1-an de junio 2026 en Kolkato, ĝuste je la komenco de la pluvsezono en Barato.



Probal ankaŭ naskiĝis en Kolkato, la 19-an de septembro 1953. Lia patro estis historiisto kaj lia patrino estis socia psikologo kaj verkisto – tiujn influojn oni povas vidi ankaŭ en la verkaro de la filo. Li studis lingvosciencon en Kolkato kaj Puneo en Barato. Li doktoriĝis pri tiu fako ĉe Universitato de Novjorko, en Usono. Tie li studis la generan sintakson de sia gepatra lingvo, la bengala.

Li instruis lingvistikon en pluraj universitatoj, interalie en Kolkato, Puneo, Hajderabado, Novjorko, San-Francisko kaj Melburno. Lia esplorlaboro ampleksis formalan sintakson, tradukosciencon, sociolingvistikon, lingvopolitikon kaj multlingvismon. Li estis kunredaktoro de gravaj periodaĵoj, interalie, *Indian Linguistics*, *Language Problems and Language Planning* kaj *Beletra Almanako*. Li estis membro de la Scienca Komitato de *IPR*.

Probal estis esperantisto longtempa. Jam kiam li estis 14-jaraĝa, li memlernis Esperanton. Ekde 1967, li estis aktiva esperantisto. Kiam li estis 17-jaraĝa, li korespondis kun Kálmán Kalocsay pri tradukado de la poezio de Rabindranath Tagore. En 1980, Probal volontulis preskaŭ la tutan jaron en la Centra Oficejo de UEA. Reveninte al Barato, li kunfondis en 1982 Federacion Esperanto de Barato (FEB) kaj servis kiel ĝia vicprezidanto. Ekde 1983, li estis membro de la Akademio de Esperanto. Li estis ĝia vicprezidanto de 2001 ĝis 2016, kaj ĝia prezidanto ekde 2016 ĝis sia morto. Probal estis elektita prezidanto de UEA en 2007 kaj reelektita en 2010, gvidante la Asocion ĝis 2013. En 2026, dum la UK en Graco, li estis elektita Honora Prezidanto de UEA.

Probal kontribuis plurmaniere dum sia longa agado en la Esperanto-movado. Li estis verkisto, tradukisto kaj redaktoro. Li verkis pli ol dek librojn kaj centojn da artikoloj en la angla, bengala, franca kaj kompreneble Esperanto. El la bengala li tradukis en Esperanton poemojn de Tagore, du romanojn kaj la aŭtobiografion de Manashi Dasgupta, sia patrino. Kaj, uzante Esperantajn tradukojn, li bengaligis kroatan infanromanon, svedan teatraĵon kaj finnan romanon.

Kiel detale montras la Panteono en Edukado.net[1], ankaŭ la pedagogia laboro de Probal estis sufiĉe ampleksa. Jam en 1985-86 li verkis oklecionan elementan Esperanto-kurson bengallingvan. En 1978 li instruis en la sanfranciska kursaro (la pra-NASK) apud David Jordan, en la barlastona kursaro apud Marjorie Boulton k. a. (1988), en la poznana kursaro apud Ilona Koutny k. a. (2009, 2016) kaj en la amsterdama kursaro apud Federico Gobbo (2016). Li membris en IEK (kaj estis ĝia prezidanto 2006-07). Li redaktis bengallingvan Esperanto-lernilon *Bishwobhasha Esperanto* de Badal Sircar (Kolkato: FEB, 2012).

Probal ankaŭ lingve mentoris plurajn baratanojn – inter ili, min. Dum sia profesorado en Universitato de Hajderabado (1989-2006), kie mi estis studento, li enkondukis min al la fenomeno Esperanto. Mia esplortemo estis sciencfikcio. En konversacioj, Probal ligis mian esplordemandaron al revoj pri pli egaleca mondo. Parto de tiu vizio estis, kompreneble, pli justa komunikado: jen Esperanto! Li havis tiun kapablon de bona edukisto: nome, fruktodone ligi tre diversajn temojn. Ĉiu konversacio kun li do alportis ion novan. Malgraŭ lia parolemo (li ja estis esperantisto, ĉu ne?) Probal estis ankaŭ zorga aŭskultanto.

Kiel jam menciite, Probal estis konata prozisto plurlingva. En ĉiuj el tiuj lingvoj, oni konsideris lin verkisto sufiĉe malsimpla! Estis ofte malfacile sekvi la pensoĉenon de lia argumentado. (Tiu komence menciita artikolo en *La Ondo de Esperanto* ne estas escepto.) Tamen, li ja kapablis esprimi sin simple, foje eĉ poezie bele! Jen ekzemplo el intervjuo kun li.

Demando: Kio estas UEA por vi?

Probal: Por mi UEA estas ĉielarko, ĉar sub ĝi, infanoj de ĉiuj koloroj ludas inter si, kaj atendas la pluvon![2]

[1] https://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=264
[2] https://www.youtube.com/watch?v=AcvAbhkwbQQ

Tiuj du trajtoj – la kapablo aŭskulti zorge kaj la inkluzivemo de transkultura, mondvasta ĉielarko – substrekas ideon, kiun li esploris en pluraj verkoj. Nome, sur tiu ĉi planedo ĉiu el ni estas gasto de la alia. Kaj temas ne nur pri homoj; li inkluzivis ĉiujn estaĵojn, kun kiuj ni dividas la Teron. Jen pacmesaĝo ekologie profunda, urĝa kaj necesa en nia epoko! Probal mankos al multaj, kaj ene de Esperantujo kaj ekster ĝi.

Spomenka ŠTIMEC:

Mi renkontis Probal en iu kongresejo antaŭ kelkaj jaroj, en iu paŭzo, dum li sidis ie, en iu trankvila anguleto dum kelkaj sekundoj, kaj mi alvenis kun unu kroata infanlibro kaj demandis: „Ĉu vi pretas tion bengaligi?" Li silentis unu minuton kaj tiam diris: „Sed kiel vi scias, ke mi devas tion fari?" Mi tute ne sciis, ke li devas traduki, sed montriĝis, ke kiam mortis lia patro, la patro lasis al la infano testamenton, en kiu estas tasko traduki, ĉar la patro opiniis, ke gravas, same kiel en la epoko de Mahatma Gandhi estis la regulo, estis la rekomendo en ĉiu familio, bonvolu dum tridek minutoj teksi. Oni teksu por kontraŭstari la britan teksindustrion. Do, laŭ simila metodo, la patro, kiu estis bengala historiisto tre grava, petis Probal traduki tridek minutojn tage por malhelpi, ke oni traduku nur en la anglan. Do, ke ne cirkulu en la mondo nur la anglosaksonaj saĝaĵoj, sed ke ankaŭ aliaj havu sian voĉon. Do, nun mi venis kun eta peto traduki kroatan verkon en la bengalan. Li diris „mi devas" kaj li faris. Kaj per tio ni eniris iun eŭropan projekton de Eŭropa Komisiono, kiu elektis Hindan Union kiel partneron por certa projekto kaj kompreneble Probal fariĝis la ĉefa partnero de Zagrebo. Sed tio estas la ideo traduki tridek minutojn tage por helpi, ke la tuta mondo havu diversajn pensmanierojn, tre filozofie kaj tre Probalece.

Ahmad Reza MAMDUHI[3]:

Probal Dasgupta, lingvisto kaj unu el la plej influaj figuroj de la nuntempa Esperanto-movado, forpasis en la aĝo de 72 jaroj. Li rigardis lingvon ne nur kiel simplan ilon por komunikado, sed kiel arenon por justeco, dialogo kaj egaleco inter homoj. Marc van Oostendrop, nederlanda lingvisto, skribis pri li: „Probal Dasgupta estis intelektulo en epoko, kiu fariĝis ĉiam malpli favora al intelektuloj." Tiu ĉi priskribo trafe montras, ke por li pensi ne estis nur profesio, sed vivmaniero.

[3] El la tutlanda irana matenĵurnalo *Ŝargh* (la 6-an de junio 2026, n-ro 5401, p. 8)

Kritiko de la „Neŭtraleco" de Lingvo

Dasgupta naskiĝis en 1953 en Kolkato en akademia familio. Lia lingva talento frue evidentiĝis, kaj en la aĝo de 18 jaroj li publikigis sian unuan sciencan artikolon. Li studis en Barato kaj poste en Usono, kie li doktoriĝis ĉe la Universitato de Novjorko en 1980. Lia disertaĵo temis pri la bengala lingvo, lia gepatra lingvo, kiu ĉiam restis en la centro de liaj intelektaj zorgoj. Li edukiĝis en la tradicio de la transforma-generativa lingvistiko de Noam Chomsky, tamen li iom post iom konkludis, ke lingvo ne povas esti komprenata kiel sistemo izolita de historio, literaturo kaj potenc-rilatoj.

Laŭ li, neniu lingvo funkcias en „neŭtrala" vakuo; tio, kion oni nomas neŭtraleco, ofte estas nur speguligo de la potenco de regantaj lingvoj. Dasgupta sukcesis starigi seriozan dialogon kun Chomsky mem pri la esenco de lingvo kaj la loko de planlingvoj, precipe Esperanto. Li argumentis, ke lingvo ne estas nur aro de reguloj, sed spaco de homa vivo, kie naskiĝas kreivo kaj senco.

Esperanto: Vivanta Idealo

Por Dasgupta, Esperanto ne estis historia kuriozaĵo, sed vivanta sperto de speco de lingva demokratio. Li aliĝis al la Esperanto-komunumo en sia juneco kaj restis fidela al ĝi dum sia tuta vivo. En lia rigardo, Esperanto ne anstataŭas etnajn aŭ naciajn lingvojn, sed estas komplementa ilo por plurlingva mondo, por ke internacia komunikado ne estu submetita al historiaj kaj politikaj malegalecoj.

Rajto je Komunikado

Dasgupta transformis la lingvan problemon en etikan aferon. Laŭ li, komunikado ne estas nur kapablo, sed speco de rajto. En mondo, kie scienco, ekonomio kaj politiko dependas de kelkaj lingvoj, lingva malegaleco povas krei sociajn kaj internaciajn maljustaĵojn. Tiu, kiu regas la mondan lingvon ekde la infanaĝo, havas pozicion malegalan kompare kun tiu, kiu devas lerni ĝin kun granda kosto kaj peno. Ĉi tiu vizio igis lin unu el la plej seriozaj defendantoj de lingva justeco.

Konservado de la Ekvilibro

Dasgupta servis kiel prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) de 2007 ĝis 2013. UEA estas internacia organizo, kiu kunordigas la kulturajn, edukajn kaj tutmondajn agadojn de ĉi tiu lingvo kaj rilatas kun organizoj kiel UN kaj Unesko. En tiu pozicio, li defendis la „rajton je

komunikado", argumentante ke neniu homo aŭ nacio devus esti flankenlasita de tutmondaj dialogoj nur pro sia gepatra lingvo.

Lia plej daŭra rolo tamen estis la prezidanteco de la Akademio de Esperanto, la plej alta scienca aŭtoritato de la lingvo. La Akademio estas supernacia institucio, kies tasko estas konservi la ekvilibron inter stabileco kaj evoluo de la lingvo. Dasgupta estis membro de la Akademio ekde 1983. Dum multaj jaroj li estis ĝia vicprezidanto kaj ekde 2016 li prezidis ĝin. Liaj kolegoj emfazas, ke li gvidis ĉi tiun institucion ne per administra aŭtoritato, sed per saĝo, pacienco kaj reciproka respekto.

Intelektulo de la Dialogo

Lia ĉeesto en la sfero de la lingvo-esploro lasis gravajn spurojn: pli ol 10 librojn kaj centojn da artikoloj. Krom lingvistikaj verkoj, liaj literaturaj tradukoj estas rimarkindaj, inkluzive de la tradukoj de la poemoj de Rabindranath Tagore al Esperanto. Unu el liaj plej gravaj libroj en Esperanto titoliĝas „Loĝi en homaj lingvoj". Eble lia ĉefa mesaĝo troviĝas tie: ke lingvoj estas la spacoj, en kiuj homoj loĝas, komprenas sin mem kaj serĉas la alian.

Heredaĵo por la Estonteco

La forpaso de Probal Dasgupta ne estas nur la perdo de universitata profesoro; ĝi estas la perdo de ponto inter saĝo kaj justeco, inter intelekto kaj respondeco. En epoko de tutmondiĝo, lia laboro ŝajnas pli necesa ol iam ajn. Li memorigis nin, ke la lingva problemo ne estas nur afero de vortoj kaj gramatiko, sed afero de digno, aliro kaj homa deco. Lia heredaĵo estos ĉeesta en ĉiu klopodo por pli justa lingva ordo en la mondo.

Raporto pri la 59-a Kongreso kaj la Simpozio de ILEI ĉe Zaozhuang-a Universitato

de Alessandra MADELLA (Italio)

Post pli ol unu jaro de intensa pretigado, finfine la Kongreso kaj Simpozio de ILEI sukcese okazis ĉe Zaozhuang-a Universitato en julio 2026. La 10-a de julio, la tago de alveno, estis jam plenŝtopita de farendaĵoj por la eksterlandaj gastoj. Tiuj, kiuj pli frue atingis la urbon, fakte, havis la elekton

inter helpi prezenti Esperanton al lokaj lernejanoj aŭ al la reprezentantoj de lokaj muzeoj, kiuj estis tre impresitaj de la granda nombro da eksterlandaj doktoroj, kiuj partoprenis en nia Simpozio. Posttagmeze, kiam pli da gastoj alvenis – inkluzive de la homoj de la antaŭkongreso en Pekino – ĉiuj estis invititaj renkontiĝi kun la estroj de la universitato, partopreni kun ili en ceremonio de arbo-plantado honore al la Kongreso kaj sidiĝi kun ili ĉetablen por bonveniga bankedo.

La estroj, inkluzive de rektoro Cong Hailin kaj vicrektoro Chu Fumin, ludis aktivan rolon ankaŭ en la malferma ceremonio de la Kongreso, la matenon de la 11-a, dum kiu mi transdonis al la Universitato gratulan tabulon de ILEI pro ĝiaj instruaj agadoj favoraj al Esperanto. Post la komuna foto sekvis la du inaŭguraj prelegoj. Arko (Gong Xiaofeng) parolis pri interretaj kursoj en Ĉinio, sin bazante precipe sur la lastatempe plurnivela agado de la itala instruisto Francesco Franceschini kadre de la projekto EToSo de ILEI. Semio (Sun Mingxiao) respondis montrante kiel la bezono de fake klerigitaj laboristoj en la Esperanto-biblioteko de Zaozhuang-a Universitato povus iĝi kialo por fortigi tie la instruadon de la lingvo de Zamenhof. Kiel argumentas Yan Ming, la nova estro de la Ĉina Sekcio de ILEI, ĉiuj lingvo-departementoj en la lando suferas pro la faciligo de tradukado pere de AI. Sed en tiu kunteksto Zaozhuang-a Universitato povus fortigi sian instruadon de Esperanto kiel difinan trajton, ekzemple instruante ĝin ankaŭ al la studentoj de la angla por profiti je ĝia pozitiva efiko rilate al metalingvistika kompetento.



Sekvis la tri prelegoj de la jam tradicia ISOA (ILEI-Seminario en Orienta Azio), en kiuj estis prezentitaj la figuro de instruisto Laŭlum (de Yu Jianchao), la Seula Esperanto-centro kaj la stato de la instruado de Esperanto en Japanio, respektive fare de Lee Jungkee kaj Kitagawa Ikuko, kies prelegojn vi povas legi en ĉi tiu numero de IPR.

En la posttagmezo de la 11-a ekis la dutaga Simpozio de ILEI, kiu vidis la ĉeeston de gravaj nomoj, laŭ la tradicio de ILEI klopodi diskutigi esperantistajn kaj ne-esperantistajn profesorojn, doktorojn kaj fakulojn pri temoj de komuna intereso. Kiel la sola organizanto, mi invitis profesorojn el 15 landoj, kun kiuj mi konatiĝis en Esperantujo aŭ dum konferencoj pri lingvo-rilataj temoj. Mi ekzemple renkontis Iino Atsushi el Japanio, kiu parolis pri lernolibroj, kiuj pensigas lernejanojn pri la lingva problemo kaj kultura koloniigado, dum la konferenco pri komputil-helpa lingvolernado EuroCALL en 2025. Simile, mi havis la ŝancon konatiĝi kun Julian Preece el la Universitato Swansea en Britio kaj Paola Bertolone el la Universitato de Romo „La Sapienza" en Italio dum konferencoj pri multlingva kaj multkultura literaturo aŭ teatro.

Bonŝance preskaŭ ĉiuj homoj, kiujn mi kontaktis, respondis pozitive kaj ĉiuj fine prezentis interesan kaj pensigan prelegon. La honoro malfermi la laborojn estis de Rama Mathew, fama emerita profesorino kaj aktivulino en Barato, kiu organizis grandajn konferencojn pri lingvo-testado kiel tiun de la Azia Asocio de Lingvotestantoj (AALA) en Chennai en 2022. Ŝi lastatempe klopodas trovi manierojn altigi la metalingvan konscion de barataj lernantoj, testante ilian komprenon de anglaj tekstoj per malfermaj demandoj, al kiuj ili rajtas respondi ankaŭ en sia gepatra lingvo aŭ per desegnaĵoj. Ĉar en la tre multlingva kunteksto de Barato instruisto povas ne koni ĉiujn lingvojn de la infanoj, tiel aktiviĝas ankaŭ pozitiva interago, kiu povigas la lernantojn mem fariĝi instruistoj pri sia propra lingvo, kun pozitivaj konsekvencoj pri memfido.

Katalin Kováts estis la homo, kiu pli proksime pritraktis la temon de taksado de la flanko de Esperanto. Ŝi precipe substrekis kiel malmulte da lingvoj en Eŭropo havas taksadon je la nivelo C2, kio multe altigas la valoron de nia lingvo en la okuloj de fakuloj. Ŝi ankaŭ montris kiel uzi ilojn por mem-taksado kaj sugestis konsideri ekzamenojn precipe kiel gravan ŝancon por mem-plibonigo. Pluraj prelegoj traktis la temon de interkultura kompetento (ekz. Ilona Koutny) kaj de konscio pri lingva diverseco (ekz. Bengt-Arne Wickström), kreante interesan debaton inter la partoprenantoj. Bedaŭrinde ne eblos mencii ĉiujn kontribuintojn ĉi-loke pro manko de spaco, sed

interesitaj samideanoj povos legi iliajn tekstojn en la aperontaj *Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2025-26*.

La lasta tago de prelegoj malfermiĝis per la prezento de la Komisiono pri Virina Agado de UEA, kun kiu ILEI organizos sian Kongreson en Pollando en 2027. Sekvis Internacia Seminario pri Esperanto-instruado, kiu tuŝis kiel kutime diversajn temojn, de la Biblioteko de Japana Esperanto Instituto (Satō Ryūsuke) al la agadoj de Itala Esperanto Instituto (Laura Brazzabeni), de la instruado ĉe la Universitato de Burundo (Aimé Patrick Manirakiza) al tiu ĉe la Universitato de Amikeco inter Popoloj en Rusio (Dima Ševĉenko kaj Anna Striganova). Finis la prelegan parton Seminario pri la konservado de la Esperanto-kulturo. Male al la resto de la programo, kiu okazis en la nova kampuso, tiu ĉi parto okazis en la malnova, kie niaj gastoj povis viziti la Esperanto-Muzeon. Semio precipe pentris larĝvidan bildon de ebloj larĝigi kaj fortigi la Esperanto-fakon de Zaozhuang-a Universitato, dum Li Bochuan (Briko) parolis pri teknikaj problemoj en la konservado kaj katalogado de la materialoj de la muzeo, kiuj en la venontaj jaroj ideale iĝos pli kaj pli ciferecigitaj kaj serĉeblaj ankaŭ de internacia publiko.

La artaj vesperoj vidis la prezentadon de ĉinaj tradiciaj artoj kiel kaligrafio kaj de riĉa danca kaj muzika repertuaro, ankaŭ danke al la engaĝiĝo de la artaj departementoj de la Universitato. Interalie, Huang Yinbao (Trezoro) instruis al la partoprenantoj la kanton „Vi kaj mi en Zaozhuang", dum Li Hyonsuk (Jesa) montris la korean tradician dancon „Arirang". Tre riĉa estis la filma programo, de la animacio „Mozi, popola sanktulo", kiu vigle bildigas historian rakonton jam konatan de ILEI-anoj danke al la novelo „Antimilitisto" de Lusin (Lu Xun), al dokumenta filmo pri Yunnan-aj elefantoj (reĝ. Duan Jike kaj Zhang Di). La filmaj kontribuoj pri teo estis aparte memorindaj, kun la dokumenta filmo „La teo de geedzoj" prezentita de Tianjin-a Esperanto-Asocio kaj la projekto VALO (Vojaĝo al la Oriento) de Maximilian Garcia kaj Wei Ningna, kiuj ankaŭ donacis al la ĉeestantoj belajn libromarkilojn en la lingvoj de UNESKO, dezajnitajn de juna stelulo de la modo en Ŝanghajo. Vicente Manzano Arrondo (Viko), kun la filino Gabriela, vigle prezentis siajn instruajn videojn el la jutuba kanalo Pika Pika Esperanto, kiuj estis tre ŝatataj de la kongresanoj.

Post la intensaj tri tagoj de prelegoj kaj spektakloj, ekis la postkongresa parto al la malkovro de la elstara loko historie okupita de provinco Shandong en la teknika kaj filozofia penso de Ĉinio. Allogaj muzeoj ne nur teorie klarigis la elpensojn de kleruloj kiel Mozi aŭ Lu Ban, sed ili ankaŭ donis la eblon ludi per iliaj aplikaĵoj al ĉiutaga vivo. Certe la vizito al Zaozhuang estis

riĉiga sperto, kiu montris al alilandaj esperantistoj tute alian bildon de Ĉinio kaj samtempe plene komprenigis kiel Esperanto povis radikiĝi kaj trovi konstantajn nutraĵojn en tiu medio. Dum la ferma ceremonio la rektoro Cong Hailin transdonis la verdan flagon kun la subskriboj de la partoprenantoj de la 59-a ILEI-Kongreso al Laura Brazzabeni, la estrarano de ILEI pri kongresoj, kiu jam komencis labori por same elstara 60-a Kongreso ĉe Jelenia Góra en Pollando, en kiu espereble multe da legantoj de IPR povos partopreni.



Ĉinaj lernantoj de la progresinta kurso kun Tatjana Loskutova

La ekzameno ILEI-UEA en Zaozhuang

La 12-an de julio 2026, dum la Kongreso de ILEI ĉe Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio, okazis sesio de la ekzameno ILEI-UEA. Yang Nan, studentino de la loka Esperanto-fako, sukcese trapasis la skriban ekzamenon je la nivelo B1. La komisiono konsistis el Laura Brazzabeni (Italio), François Lo Jacomo (Francio) kaj Alessandra Madella (Italio).

La ekzameno ILEI-UEA diferencas de la KER-ekzameno de UEA (kiu ankaŭ okazis en Zaozhuang) precipe pro sia kultura parto, kiun ni klopodis adapti kiel eble plej multe al la azia kunteksto. Kompare kun pli fruaj versioj de la ekzameno, en la nova versio estis ankaŭ pli konscie aplikitaj principoj de docimologio, la scienco pri testado kaj taksado.

La estraro de ILEI daŭre laboros por plibonigi la ekzamenon kaj por pretigi studmaterialojn pri Esperanta literaturo, Esperanto-eksperimentoj kaj aliaj temoj.



Postkongresa grupo antaŭ la statuo de Lu Ban

Impresoj pri la 59-a Kongreso de ILEI

Aimé Patrick MANIRAKIZA (Estrarano de ILEI pri Afriko):

La universitato okupas areon de 126 hektaroj, kio estas pli granda ol la areo de la kvartalo, kie mi loĝas en Burundo. La programo de la kongreso estis bone organizita. Tio, kio precipe altiris mian atenton, estis la granda respekto de la tempo: por la ĉinoj, la tempo estas konsiderata kiel valorega, simile al oro. Ĉiuj prelegantoj estis pretaj 10- ĝis 15 minutojn antaŭ la komenco de sia prezentado. Mi ankaŭ havis la okazon prezenti, nome de Burundo, programon, kiu baldaŭ estos efektivigita: la instruado de Esperanto en la universitato de Burundo. Tiu kongreso estis rimarkinde organizita, precipe danke al la konstanta ĉeesto de la universitataj estraranoj apud ni, kaj en la nova kampuso, kaj en la malnova. Por konservi la memoron kaj gravecon de la kongreso, ILEI, kunlabore kun la Universitato Zaozhuang, sukcesis planti memor-arbon, kiu povas daŭri pli ol 100 jarojn, kiel monumento pri Esperanto.

Ĉinio abundas je historiaj kaj kulturaj lokoj. Mi havis la okazon viziti plurajn signifoplenajn lokojn, ĉiu el ili donis superrigardon pri la riĉeco de la ĉina historio kaj kulturo kaj atestis la vojon, kiun tiu lando trairis ĝis sia nuna evoluo. Mi ne povis viziti ĉion pro la multegaj lokoj, kiuj markas la historion kaj kulturon de Ĉinio.



La ĉina popolo montriĝis afabla kaj varmkora dum la tuta restado. Dum miaj restadoj, mi ekhavis novajn amikojn, kaj la plimulto el la partoprenantoj povis malkovri mian landon, Burundon.

La plimulto de la ĉinoj forte dependas de teknologio por komuniki kaj organiziĝi ĉiutage. Por eksterlandano en Ĉinio sen interreta aliro, la komunikado fariĝas ege malfacila, ĉar neniu povas kompreni vin alimaniere. Antaŭ ol vojaĝi al Ĉinio, vi devas bone prepariĝi per ĉiuj necesaj iloj por ebligi al vi komuniki kun lokuloj.

Ĉi tiu restado en Ĉinio ebligis al mi lerni multajn aferojn. Mi precipe rimarkis, ke ĉio tie estas cifereca, ke la tempo estas tre estimata kaj respektata, ke malfruo estas konsiderata kiel grava kulpo kaj ke sukceso postulas rigoran kaj daŭran laboron.

Mi volas esprimi mian sinceran dankon:

- Al ILEI por ebligi min partopreni en la Kongreso
- Al la organiza komitato LLK pro gastamaj kaj bonvolaj agoj
- Al la administra korpo de la Universitato de Zaozhuang pro ilia gastamo kaj malfermiteco al la mondo.

TAN Zhongqi 谭钟琪 (prelegantino de la Simpozio el la Artkolegio de Kunming, Ĉinio):

La akademia konferenco de ILEI okazis en malstreĉiga kaj amika medio. Ni lernis la lastajn eltrovojn pri Esperanto-edukado, aŭskultis interesajn prelegojn kaj povis interparoli kun fakuloj el la tuta mondo.

Mi multe ĝuis aŭdi Profesorinon Rama Mathew paroli pri lingvolernado en la barata plurlingva medio en maniero, kiu valorigas la sperton de la lernantoj. Mia plej ŝatata momento estis la instruaj videoj de hispana patro kun sia filino (Viko kaj Gabriela). Ili mem realigis tiujn videojn tiom kreeme kaj amuze, ke ili donis al mi la deziron plonĝi pli profunden en la lernadon de Esperanto.

Kun miaj geamikoj, YU Mei kaj WEI Yongquan, mi prezentis en la Simpozio la plurnacian kulturon de Yunnan-provinco kaj en arta vespero dokumentan filmon pri la konservado de sovaĝaj elefantoj. Post nia prelego multaj fakuloj diris al ni, kiom ĉarma estis por ili la etna kulturo de Yunnan.

La konferenco vere ofertis varman kaj engaĝigan medion por kultura interŝanĝo.

Piet GLORIEUX (Prezidanto de Flandra Esperanto-Ligo):

Mia unua konatiĝo kun (Esperanto en) Ĉinio superis miajn atendojn. Min impresis forte la rezultoj de la Esperanto-fako de la Zaozhuang-universitato, kiu en sia ne tiel longa vivdaŭro donis konsiderindan kvanton da bakalaŭraj diplomoj kaj baldaŭ eble eĉ magistrajn titolojn.

Muzeo pri Esperanto komparebla al la Ĉina Esperantomuzeo miaopinie ne ekzistas en la resto de la mondo. La videbla kolekto estas tre profesie prezentita kaj krom tio ekzistas ankoraŭ giganta trezoro de ne ekspoziciitaj objektoj.

La ĉinaj esperantistoj estis tre gastamaj kaj helpemaj kvankam la komunikado kun ordinaraj ĉinaj esperantistoj estis „de varia kvalito”. Kun multaj mi povis kvalite konversacii, sed kun aliaj nur „skribe”... kvankam ili senerare skribis. El la kontaktoj kun la multaj ĉinaj samideanoj mi ankaŭ pli bone komprenis la similaĵojn inter la mandarena kaj Esperanto kaj kiuj aspektoj de la okcidenta Esperanto-uzado igas – eĉ – Esperanton malfacila por ĉinoj.

Tio ne malhelpis min ĝui la ekskursojn en la provinco, kiu estas la lulilo de kelkaj el la plej grandaj saĝuloj de la ĉina civilizacio: Konfuceo, Luban kaj Mozi.

Konklude, mi invitas ĉiujn esperantistojn malkovri unu el la plej gravaj civilizacioj en la mondo. Sen kono de Ĉinio oni ne havas kompletan bildon de la mondo.

JIA Rongxia 贾荣霞 (Jadobona, Ĝenerala Sekretario de Xinxiang-a Esperanto-Asocio):



Dum la 59-a Kongreso de ILEI en Zaozhuang-a Universitato, miaj impresoj estis:
Unue: Mi sincere admiras multajn fakajn, eminentajn eistojn kaj volontulojn, kiuj laboris por sukcese okazigi la kongreson.
Due: Mi profunde sentas, ke la granda graveco de Esperanto plene elmontriĝas en internacia interŝanĝo.
Trie: la forta antaŭenpuŝo de Eo en edukado kaj la bezono de fakaj specialistoj.
Kvare: Dankon al la Organiza Komitato pro la Eo-kurso instruita de eksterlanda fakulino, kiun ĝi aranĝis. Mi partoprenis ĉiujn lecionojn de instruistino Tatjana el Rusio. Ŝiaj instrumetodoj kaj interagadoj kun la kursanoj dum la lecionoj donis al mi grandegan utilon.
Kvine: Mallongaj filmoj donis al ĉiuj ĉeestantoj intuiciajn signifojn, kiuj havas edukan valoron. Ekzemple, la animacio „Popola Sanktulo Mozi", la dokumenta serio „VALO" de Ma-Ga Filmoj ktp.

(Surfote: Alessandra Madella kaj Jia Rongxia)

Mariana PITAR (Vicprezidanto de Esperanto-Asocio de Rumanio):

Por mi estis la unua fojo en Ĉinio, la unua fojo partopreni ĉe ILEI-kongreso. Do, multaj belaj surprizoj. Unue, la gastigantoj estis ege afablaj kaj helpemaj, ĉiam ĉeestante apud ni por konatiĝi kun ni, por interŝanĝi impresojn pri nia lando kaj lingvo, aŭ pri Ĉinio kaj ĝiaj loĝantoj, pri la belaj lokoj kiujn ni vizitis en Ĉinio. Okazo por konatiĝi ankaŭ kun partoprenantoj de diversaj landoj kun diversaj ŝatokupoj. La programo estis bunta, la prelegoj interesaj kaj science altnivelaj. Partoprenis scienculoj de diversaj fakoj kaj de diversaj landoj. Mi admiris la sukceson de Esperanto en Zaozhuang, kiu havas fakon de Esperanto en Universitato kaj muzeon de Esperanto, kiun ni, certe, vizitis. Sekvis vizitoj de interesaj lokoj kaj spuroj de famaj filozofoj, kiuj vivis en la ĉirkaŭaĵoj.

Apud tiu sperto, mi esperas partopreni pliajn ILEI-kongresojn kaj iam viziti denove Ĉinion.

Kial Seula Esperanto-Kulturcentro ekzistas?

de LEE Jungkee (Dir. de Seula Esperanto-Kulturcentro)

Historie

La 15-an de decembro 1991, Seula Esperanto-Kulturcentro (SEK) estis fondita fare de LEE Jungkee en Seulo, Koreio, por havi monatan kurson de Eo. Tiam mi pensis, ke por fortigi nian movadon antaŭ ĉio, novaj e-istoj devas naskiĝi tra regula kaj sistema edukado fare de iu konstanta instanco. Mia sonĝo estis ideale bela kaj teorie bona, sed ĝia realigo estis tute alia. Por teni la edukejon mi devis pagi ne malgrandan sumon por lupago ĉiumonate. En la jaro 1998, mi ne plu povis teni la edukejon, tial mi devis translokiĝi al pluraj lokoj, kiuj ne postulas lupagon helpe de pluraj oficejohavantaj esperantistoj, por daŭrigi la kurson.

En la jaro 2000, SEK translokiĝis al la centra parto de Seulo helpe de tiamaj samideanoj, kiuj kolektis monon por garantia sumo de la nova oficejo de SEK.

Post 25 jaroj, mi estis devigita nememvole forlasi la oficejon pro renovigo de la ĝisnuna luita konstruaĵo. Tiam, en la jaro 2025, mi decidis translokiĝi al la nuna loko, kiu estas facile alirebla por civitanoj, kiuj volas lerni Esperanton.



‘Memore al la 300-a kurso’ de Seula Esperanto-Kulturcentro (2017.4.1)

La kialo de ekzisto de SEK

Laŭ konata proverbo, „se vi planas unujaran projekton, vi semu grajnon, se vi planas dekjaran projekton, vi plantu arbon kaj se vi planas centjaran projekton, vi eduku homojn”. Mi pensis, ke por vivodaŭro de nia movado, ni esperantistoj devas havi atenton pri edukado, tra kiu novaj esperantistoj naskiĝos kaj fekundigos la Esperanto-kulturan terenon. Neniel kaj neniom nia movado progresos, se ne estus edukado-sistemo de Esperanto. Sed la atingo de tiu celo ne estas tiom facila kiom oni pensas teorie. Por realigi la projekton, tri kondiĉoj estas postulataj t.e. edukejo, kurso-gvidanto kaj kursano. Por teni aŭtentikan edukejon, oni devas pagi lukoston, por dungi instruiston, oni devas pagi salajron aŭ honorarion kaj varbi kursanojn estas ne facile en nuna socia situacio, en kiu oni pensas, ke la angla lingvo estas absoluta internacia lingvo. Vere tia granda socia muro staras antaŭ ni, esperantistoj. En nuna momento, mi estas fiera pro tio, ke mi povis daŭrigi la monatan kurson por civitanoj preskaŭ senpaŭze dum 35 jaroj.

Espero al esperantistoj

Neniu el esperantistoj de la mondo atendas la tragedian situacion, ke Esperanto ne plu ekzistu sur la terglobo. Do, kion ni devas fari por eviti tian situacion? Konklude dirite, ni devas semi kaj semi Esperanto-semojn kiel diraĵo de Zamenhof. Jen estas liaj profetecaj apelacioj:

„Ni semas kaj semas, neniam laciĝas
pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas.
Ni semas kaj semas konstante.
'Ho ĉesu!' mokante la homoj admonas.
'Ne ĉesu, ne ĉesu!' en kor' al ni sonas.
'Obstine antaŭen, la nepoj vin benos,
se vi pacience eltenos.'"

Cele al la finvenko de nia movado, senĉesa semado estas la plej aŭtentika vojo, tial Seula Esperanto-Kulturcentro daŭrigos sian marŝadon al la celo senpaŭze.

Se ekzistus simila edukado-centro kiel SEK almenaŭ en ĉiuj ĉefurboj, nia movado povus esti pli esperplena.



Memore al la 400-a kurso de SEK

En la 22-a de majo, 2027, SEK havos feston nome, 'Memore al la 400-a kurso de SEK' en Seulo. Kutime la evento okazas en ĉiu 50-a kurso de SEK por interkonatiĝi inter la kursanoj, kiuj lernis Esperanton dum tiu periodo en SEK. Tra la evento la iamaj kursanoj rekolektiĝas kaj dividas sian iaman lernado-etoson.

Mi firme kredas, ke tra tiu historia evento de SEK evoluos kaj progresos kun sistema edukado de Esperanto.

Raporto pri la prezento: Instruado de Esperanto de JEI kaj en Japana Esperanto-Movado (resumo de prezento)

de KITAGAWA Ikuko (prezidanto de Japana Esperanto-Instituto)



En la prezento mi donis superrigardon pri la nuna situacio de Esperanto-instruado en Japanio.

- **Diversaj instru-lokoj:** Esperanto-instruado en Japanio okazas en pluraj organizoj, inkluzive de lokaj grupoj, universitataj kursoj kaj studentaj kluboj, aldone al la agadoj de Japana Esperanto-Instituto (JEI).
- **Materialoj kaj subteno de JEI:** Kvankam JEI mem nuntempe ne rekte organizas enkondukajn kursojn por komencantoj, ĝi provizas abundajn lerno-materialojn en sia retejo. Inter ili estas la serio de ekzercoj kun pli ol 110 lecionoj, senpage uzebla por memlernado aŭ por lokaj kursoj. Aparte, la eduk-fako de JEI rete respondas al la demandoj de memlernantoj.
- **Plialtigo de lingvokapablo:** JEI daŭre ofertas diversajn materialojn kaj ŝancojn por helpi al la lernantoj plibonigi kaj altigi sian Esperanto-nivelon.
- **Kvalifikaj ekzamenoj de JEI:** La kvalifikaj ekzamenoj (de la 1-a ĝis la 4-a grado) gvidataj de JEI fariĝas pli kaj pli popularaj inter junuloj, kaj la nombro de ekzamenatoj pliiĝas. Por sukcesi en iu ajn grado, oni devas akiri almenaŭ 60 poentojn en la skriba kaj la konversacia fakoj.
  - **Grado 1:** Nivelo por libere kaj flue uzi Esperanton por kompleksaj enhavoj (skriba fako: 90 min., konversacia fako: ĝis 10 min.).
  - **Grado 2:** Nivelo por ordinare uzi la lingvon kaj klarigi la gramatikon al aliaj, taŭga por gvidantoj de elementaj kursoj (skriba fako: 90 min., konversacia fako: ĝis 10 min.).

- **Grado 3:** Nivelo por legi kaj skribi facilajn frazojn kaj memstare sin prezenti (skriba fako: 60 min., konversacia fako: ĝis 5 min.).
- **Grado 4:** Nivelo por legi kaj skribi elementan enhavon kaj sin prezenti per demando-kaj-respondo (skriba fako: 60 min., konversacia fako: ĝis 5 min.).

Klerigaj kaj informaj agadoj:

- Esperanto-Tago en Japanio: La 12-a de junio estas registrita kiel Japana „Esperanto-Tago" por memorfesti la fondon de Japana Esperantista Asocio (la unua tutlanda organizaĵo) en 1906.
- Memorprelego kaj temo: Ĉi-jare okazis hibrida prelego kun ĉirkaŭ 80 partoprenintoj pri la temo „Zamenhof kaj Cionismo", elektita pro la nuna tutmonda situacio kaj la strečiĝoj en Proksima Oriento. La preleganto estis Hisasi Kitagawa (lektoro če la Malferma Akademio de Tokia Universitato de Fremdaj Studoj) kaj la diskutanto estis Tomonori Teraoka (lektoro če la Universitato Ĉukjo).

ILEI-JP organizas 30-minutan kurson „Ni parolu!"

・Paroliga kurso "Ni parolu!"

„Senpaga reta kurso kun 10 lecionoj, okazigata individue per Zumo dum po 30 minutoj de ILEI-JP. Ĝi estas tre populara kurso por komencantoj.

Instruaj agadoj auspiciitaj de JEI (plej nova ekzemplo):

- **Enkonduka kurso de Esperanto-Societo de Kawasaki:** Tiu loka grupo organizas 7-lecionan enkondukan kurson gvidatan de juna gvidanto Suzuki Ryuzo (magistriĝa studento če la Universitato de Tokio). 45 homoj aliĝis al tiu ĉi kurso.
- **Esperanto en komputilaj ludoj:**
  - **„Kotonoha Amrilato":** Ekde 2017, la komputila ludo *„Kotonoha Amrilato"* uzas Esperanton kaj pozitive influas junulojn, kiuj ŝatas komputilajn ludojn. Japana Esperanto-Instituto (JEI) faras la lingvan kontrolon por la ludo. Baldaŭ aperos ankaŭ la nova ludo *"Kotonoha-Lernado"*.

Jarlibro pri Japana Esperanto-Movado:

- **Registritaj agadoj:** En la *Jarlibro pri Japana Esperanto-Movado* estas registritaj la agadoj kaj informoj de ĉirkaŭ 100 organizoj kaj grupoj (aŭ grandaj aŭ malgrandaj) tra Japanio.
- **Esperanto-kursoj en universitatoj:**

Esperanto estas instruata aŭ ofertata en pluraj altlernejoj tra Japanio, inter ili:

- Universitato de Kioto (*Universitato de Kyoto*)
- Universitato Kyoto Sangyo (*Universitato de Kyoto Sangyo*)
- Universitato de Osako (*Universitato de Oosaka*)
- Gubernia Universitato de Hiroŝimo (*Universitato de Hiroshima*)
- Universitato de Kjuŝuo (*Universitato de Kyushu*)
- Tokia Universitato de Fremdaj Studoj (*Tokia Universitato pri fremdaj studoj* – retaj kursoj por civitanoj)

Esperanto-Kluboj en universitatoj:

- Universitato de Hokkaido
- Sophia Universitato (Tokio)
- Universitato de Kyoto (Kioto)
- Universitato de Oosaka (gubernia)
- Universitato de Kobe pri Fremdaj studoj

- **Kunlaboro kun JACTFL kaj plurlingva edukado:**
  - **Aliĝo al JACTFL:** JEI membriĝis al JACTFL (*Japan Council on the Teaching of Foreign Languages*, t.e. Japana Konsilio por Instruado de Fremdaj Lingvoj) en 2023. JACTFL agadas por enkonduki diversajn fremdajn lingvojn krom la anglan kaj realigi plurlingvan edukadon en lernejoj, fojfoje konsultante kun la Ministerio de Edukado.
  - **Esperanto en plurlingva kadro:** En JACTFL troviĝas instruistoj kaj profesoroj pri diversaj lingvoj (korea, ĉina, germana, franca, rusa, hispana ktp.), kiuj montras tre afablan kaj simpatian sintenon al Esperanto.
  - **Rolo de esperantistoj:** Provoj kaj simpozioj de JACTFL regule gastigas esperantistojn aŭ simpatiantajn fakulojn. Prof. Kimura Goro

Christoph kaj mi mem funkcias kiel estraranoj en tiu organizaĵo, emfazas la gravecon konsideri Esperanto-edukadon ene de pli larĝa kunteksto de plurlingveco.

Instrui Esperanton laŭ la metalingvistika kompetento[4]

de Vicente MANZANO-ARRONDO, Viko (Universitato Espero de Kongo)

Laŭ iu fermita aŭ preciza difino de metalingvistika kompetento (MK), oni komprenu ĝin kiel la kapablon lingve pensi pri la lingvo. Temas pri lingva konscio, tiel ke oni povas pripensi la proprajn lingvaĵojn, lerni kaj decidi pri ili.



La lingvo estas kompleksa kaj vasta estaĵo, kiu gravas en la plej gravaj homaj agoj kaj spertoj. La lingvo enplektiĝas kun la tempa, spaca kaj socia kuntekstoj. Kongrue kun tio oni povas pripensi la metalingvistikan kompetenton pli malfermite. Tio okazis dum la simpozio de ILEI de 2026, kies titolo estas *Plialtigi lingvan konscion*. Dum la lasta sesio, la partoprenoj de Bernhard Tuider, Ekaterina V. Bebenina, Kimura Goro kaj A. Giridhar Rao faciligis kompreni la metalingvistikan kompetenton, MK, laŭ iu ambicia vidpunkto, kiu inkluzivas kaj la justecon kaj la rolon de Esperanto. Jen la sinteza konkludo de tiu mirinda sesio.

MK kiel justeco

Esti konscia pri la lingvo implicas scii pri ĝia rolo en la homa ekzisto ene de la socia, politika aŭ historia fluoj. Ĉio okazas ene de procezoj. La spertoj venas de ie kaj iras ien. Sperti la lingvon ne estas escepto. Pro tio MK

[4]Ĉi tiu kontribuo ripozas sur la altnivelaj analizadoj de Bernhard Tuider, Ekaterina V. Bebenina, Kimura Goro kaj A. Giridhar Rao. Iliaj laboroj inspiris ĉi tiun tekston, kiu povas esti interpretita kiel libera konkludaro.

inkluzivas konscii ankaŭ pri la lingva justeco. Kio okazos, kiam la homoj H uzas la lingvon L en la kunteksto K? Kio okazus, se oni agus malsame? Kial oni tiel agas? Kiuj pasintaj okazaĵoj faciligas la nunajn lingvajn spertojn? Kiel la homoj kunlaboras en la nuna mondo aŭ en aliaj eblaj mondoj pere de siaj lingvaj kondutoj?

Inter pluraj ebloj, la sesio tuŝis tri flankojn rilatitaj al ĉi tiu konscio:

1. Gravas demokratiigi la aliron al la materialoj de la scio. Altigi la MK laŭ la vidpunkto de la justeco implicu faciligi, ke ĉiuj havu la oportunon scii danke al la lingvaj produktoj de aliaj en ties historia kunteksto. Bona ekzemplo estas la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko.
2. Ofte oni komparas la uzon de diversaj lingvoj tra la okulvitroj de la justeco. Ene de Esperantujo iĝis kutimo kompari la anglan kaj Esperanton. Tiu komparo ripozas sur la ĉefa aserto, ke Esperanto ne fortigas iun konkretan lingvon, popolon, ŝtaton aŭ landon mal-fortigante aliajn. Tamen, Esperanto estas en sinsekva evoluo. Do oni zorgu, ke Esperanto iĝu pli universala (justa), tiel ke la ĉefa aserto estu vero.
3. Ne nur la tuta mondo estas plurlingva. En ĉiu parto de la mondo oni povas renkonti la plurlingvecon, sendepende de ĝia grandeco. La migrado, la turismo, la monda interŝanĝado, la internacia komunikado ... miksas homojn ĉie. Ĉar ni loĝas en plurlingva realo, la justa MK pli faciligu la komunikadon inter homoj ol postulu la purecon de la lingvo.

MK kiel ena motoro

Nuntempe estas malfermitaj pluraj debatoj rilate al la roloj de la Artefarita Intelekto, AI. Tiel oni povas defendi, ke ĝia ekzisto malgravigas la MK-on, ĉar pluraj celoj de la MK povas atingiĝi pere de AI. Eble tia maniero pensi rilatas al miskompreno, pri tio, kio estas kapablo.

Mi proponas metaforon por bone kompreni la eraron, kiun mi nomas la metaforo de motorloko.

Motoro estas fonto de movo. Io moviĝas, ĉar ĝi estas movita de alio (aserto de Aristotelo). Oni povas pensi, ke la homo H faras ion, ĉar li havas la precizan motoron, kiu plenumas tion. La motoro povas esti ena aŭ ekstera. Se la motoro estas ene de H, H havas kapablon. H kapablas fari ion, ĉar havas

la motoron, kiu plenumas tion. Ĉie, kie H estas, estas la kapablo. Se la motoro estas ekstere de H, H havas dependecon. H dependas de la aliro al tiu motoro por plenumi ion. Kie H povos plenumi tion? Nur tie, kie H havas alireblon al la ekstera motoro.

Laŭ tiu metaforo, MK konstruas kapablon, ĉar ĝi semas la motoron ene de la homo. AI implicas dependecon, ĉar temas pri motoro ekster la homo.

MK kiel lingva konscio

Studoj montras, ke MK havas plurajn avantaĝojn rilate ne nur al la lernado de lingvoj, sed ankaŭ al la sukcesa kaj respektema vivo en socio.

Ekzemplo de la unua avantaĝo estas nomita Transfero. Danke al la transfero, la konscio pri kiel funkcias aŭ kiel oni spertas la lingvon A iel transiras al la lernado de la lingvo B, tiel ke la konscio helpas pli bone lerni ĝin.

Ekzemplo de la dua avantaĝo estas la Mediacio. Tradicie oni dividis la regadon de iu lingvo en du kategorioj: konsumo kaj produkto, siavice dividitaj en aliajn du laŭ la medio: skriba aŭ aŭda. Do oni instruas kaj lernas atentante pri la kapabloj legi kaj skribi tekstojn, kaj kompreni kaj produkti babiladojn. Tiu tradicio kompletiĝis pere de alia kapablo: la mediacio. La homo A mediacias inter la homo B kaj la homo C, faciligante, ke B komprenu la lingvan produkton de C. Ne nur temas pri traduko aŭ interpreto, temas pri pluraj lingvaj situacioj, kie la mediacianto ebligas la interkomprenon. Tio povas okazi eĉ ene de la sama lingvo.

MK en Esperanto

Laŭ ampleksa vidpunkto, la MK estas pli ol lingva kapablo. Kiel dirite, ĝi rilatas ankaŭ al la mondo de la justeco, siavice loĝanta en la dimensioj de la politiko, de la socio aŭ de la planedo mem. Post konscii pri la graveco kaj allogaj promesoj de la MK (eble meta-metalingvistika kompetento), estas facile kompreni la oportunon eduki novajn esperantistojn ankaŭ de la vidpunkto de la MK: konscio pri la lingvo Esperanto, konscio pri la justeco, konscio pri la historiaj procezoj, konscio pri la mediacio... konscio pri la forta rilato inter ĉiuj el tiuj eroj.

Tiel, la tasko instrui Esperanton iĝas tasko eduki homojn vivi en planedo plurlingva kaj malekvilibra, kies plena justeco restas ege malproksima.

Italio

UEA honorigis centjaran Eo-instruistinon Norma Cescotti Covelli

Norma Cescotti Covelli el Trento ĉi-jare, la 10-an de julio, festis sian 100-an naskiĝtagon!



Malgraŭ tiu grava (kaj granda) jubileo, Norma daŭre viglas kaj gvidas retajn Esperanto-kursojn. Tiel ŝi supozeble estas la plej aĝa Esperanto-kursgvidantino en la mondo!

Okaze de la jubileo, danke al iniciato de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) kaj ĝia prezidantino, UEA (Universala Esperanto-Asocio) atribuis al Norma Diplomon pri Elstara Agado. UEA jene vortumis la motivon de la honorigo: „Pro sia eksterordinare longdaŭra kaj sindona instruagado por Esperanto kadre de Trenta Esperanto-Asocio kaj memstare, kaj en Trento kaj rete. Nuntempe centjaraĝa, ŝi plu aktive gvidas retajn kursojn kaj senlace transdonas la lingvon kaj ĝiajn idealojn al novaj generacioj, tiel donante maloftan ekzemplon de dumviva servo al edukado kaj al la Esperanto-komunumo.”

Ni aldonu, ke post la fermo de la 111-a UK en Graz, la prezidanto de UEA, Fernando Maia, veturis al Trento por persone transdoni la diplomon al Norma. Ni gratulas Norman kaj esperas, ke ŝia ekzemplo estos instiga por multaj Esperanto-instruantoj tra la mondo.

Pli pri la interesa vivo de Norma oni povas legi ĉe „Panteono” de edukado.net *https://mallonge.net/PanteonoNorma.*

Marija BELOŠEVIĆ

Kubo

Jam de pluraj jaroj Kuba Esperanto-Asocio praktikas E-instruadon, kiun antaŭenigas organizo de ĉiujaraj diversnivelaj lingvaj kursoj por la civitanoj en la Esperanto-Centro de Kuba Esperanto-Asocio en Havano. Kutime ĉi-

kursojn gvidas lokaj instruistoj kaj instruantoj, kiuj pretas ĉiam akiri novajn sciojn pri aliro al E-instruado. Kaj tiu ĉi eblo prezentiĝis.

Mi volas kunigi vin kun agrabla sperto: la vizito al la ĉefurbo de Kubo de la esperantista instruistino el Rusio Tatjana Loskutova por gvidi kurson de la pasinta jaro.

La kurso, kiu kunvenigis ĉirkaŭ dek du progresantojn, estis tre ege dinamika kaj valora. Tatjana montris sin tre profesia instruistino klopodante partoprenigi la kursanojn kiel eble plej multe por evoluigi ilian komunikan kompetenton kaj atentante pri la klara prononco ĉefe de la akuzativa finaĵo -n kaj la finaĵo -s, elementoj esencaj por ĝusta komunikado kaj kompreno.

La lecionoj emfazis la konsciiĝon pri la internacieco de Esperanto, instigante la eviton de la influo de la hispana dum la formulado de ideoj kaj frazoj. La kursanoj devis legi tekstojn pri E-temoj, plenumi gramatikajn ekzercojn, klare prononci E-sonojn, kanti movadajn kantojn kaj esprimi siajn opiniojn rilate temojn gravajn, ĉio en vigla kaj partoprena etoso.

Tatjana kaptis la atenton de la grupo per diversaj rimedoj kiel videoj, podkastoj kaj muziko, montrante sin komprenema pri la malsama lingva nivelo de ĉiu partoprenanto. Sendube ŝi estas sperta instruistino, kies metodiko ne nur progresigis la lernantojn, sed ankaŭ konsciigis ilin pri la bezono daŭre studi kaj perfektiĝi pri la lingvo de Zamenhof.

Dum la adiaŭa renkontiĝo la ĉeestantoj tre dankis la helpon de la kara instruistino.

Krom la kurso en Havano, sinjorino Tatjana Loskutova vizitis ankaŭ aliajn kubajn provincojn (urbojn Cienfuegos, Villa Clara, Trinidad en provinco Sancti Spiritus kaj Matanzas), kie ŝi renkontiĝis kun lokaj esperantistoj. Tie ŝi ankaŭ lasis siajn pozitivajn pedagogiajn spurojn. Pri la vizito de Tatjana raportis la elsendo de la Radio Havano Kubo Esperanto 29-06-25, kiun eblas aŭskulti en https://www.youtube.com/watch?v=JWvc0wBN8Qs (ekde 09.48 min.)

Nome de la kuba esperantistaro, la nacia estraro de Kuba E-Asocio esprimas elkoran dankon al la instruistino Tatjana pro ŝiaj neforgeseblaj lecionoj.

Kara Tatjana, niaj aktivuloj ne forgesos vin!

Prof. D-ro. Julián Hernández ANGULO
Nacia Estrarano pri Kapabligo

Serbio

Retaj kursoj kaj nova kampanjo en Serbio

En majo finiĝis la kursoj de la lerneja jaro 2025/26. La sep kursojn gvidis la volontula instruista teamo de Serbia E-Ligo (SEL): Aranka LASLO, Nedeljka LOŽAJIĆ, Živanko NOVAKOV kaj Jovan ZARKOVIĆ.

Ekzameno estis organizita nur por la du grupoj de komencantoj – vidantoj kaj nevidantoj – la 16-an de majo 2026. Ĝi okazis rete, ĉar la kursanoj loĝas en diversaj urboj de Serbio kaj eĉ en Montenegro. Ekzameniĝi decidis sep kuraĝuloj, kaj ĉiuj sukcesis.

Laŭplane SEL intencis solene disdoni la diplomojn dum la IFEF-kongreso en Beogrado kaj Mokra Gora, sed bedaŭrinde la plimulto de la kandidatoj ne povis veni. Tial la atestiloj estis senditaj al ili per poŝto.

Dum la somero plu okazas la Tradukekzercoj en tri grupoj, por helpi al la kursanoj plialtigi sian lingvonivelon jam antaŭ la nova lernojaro. La instruadon gvidas Živanko NOVAKOV.

La 26-an de julio, okaze de la Tago de Esperanto, SEL komencis sian novan kampanjon por la aŭtunaj retaj kursoj. Ni atendas ne nur kursanojn el Serbio, sed ankaŭ el aliaj landoj, kondiĉe ke ili almenaŭ iom regas la serban lingvon, kiu estas la helplingvo de la kursoj.



Aranka LASLO, ILEI-sekciestro de Serbio

Tago de Lernado

„Inter volontulado, amatoreco kaj instruado per lertigitaj instruistoj, kie estas la vojo?"

Ankaŭ ĉi-jare la tradicia programero de la 111-a Universala Kongreso **„Tago de Lernado"**, ĉi-foje kun la temo „Inter volontulado, amatoreco kaj instruado per lertigitaj instruistoj, kie estas la vojo?", altiris grandan intereson. Estis prezentitaj naŭ prelegoj pri tre vasta gamo da temoj, kiuj vekis viglan intereson ĉe la aŭskultantaro. Ofte eĉ mankis tempo por (sufiĉa) diskuto.

La seshora programo komenciĝis per salutoj de la prezidantoj de UEA **Fernando Maia** kaj de ILEI **Ahmad Mamduhi**. Ambaŭ emfazis la tradicion kaj gravecon de la Tago de Lernado, aparte dankante la multajn instruistojn kaj instruantojn, kiuj plejparte volontule instruas Esperanton.



En la unua prelego la vicprezidantino de la LKK **Norina Schantl (Aŭstrio)** prezentis la eduksistemon de la gastiganta lando, Aŭstrio.

La enkondukan prelegon ligitan al la temo de la Tago prezentis **Mireille Grosjean (Svislando)**. Dum la prelego ŝi proksimigis al la publiko la defion, kiu hodiaŭ staras antaŭ nia movado. Nome, la malkovro de nia lingvo kaj de

ĝia funkciado tiom forte entuziasmigas la lernantojn, ke ili tuj komencas instrui ĝin. Almenaŭ parto de ili transiras al instruado tre rapide. Tio starigas gravan demandon pri la rilato inter entuziasmo, sperto kaj necesa kompetenteco por instrui la lingvon.

Bernhard Tuider (Aŭstrio) praktike montris, kiel oni povas rapide kaj efike traserĉi kaj trovi dokumentojn en la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Temas pri valora kolekto, kiu konservas kaj disponigas pli ol 150 000 dokumentojn, multajn el ili utilajn ankaŭ al Esperanto-instruistoj.

Zsófia Kóródy (Germanio) per la prelego „La rolo kaj respondeco de kursgvidantoj, Esperanto-instruantoj" daŭrigis la pensojn prezentitajn de Grosjean. Oni devas konscii, ke nia movado ne havas multajn profesiajn Esperanto-instruistojn kaj ke mankas klerigaj institucioj, sed tamen la rolo de instruistoj estas aparte grava por la disvastigado de Esperanto.

Unu el la projektoj, kiuj bone disvolviĝas sur volontula bazo, estas **„Ekparolu!"**. Pri ĝi parolis **Katalin Kováts (Nederlando/Hungario)**. La dekjara ekzisto de „Ekparolu!" klare montras, ke la kombino de entuziasmo, profesieco kaj volontulado povas doni bonajn fruktojn. Aparte kortuŝa estis la momento, kiam dum la prelego aperis kelkaj „geonkloj", t.e. spertaj esperantistoj, kiuj parolas Esperanton kun interesitoj por plibonigi ilian kapablon konversacii.

Al la temo kontribuis ankaŭ **Duncan Charters (Usono)**. En la prelego „Kiel taksi, subteni kaj pliefikigi neprofesian instruadon de Esperanto" li traktis kelkajn kernajn demandojn: Kio karakterizas kompetentan Esperanto-instruanton? Kiujn kompetentojn li bezonas? Kiel oni povas rapide kaj efike prepari novajn instruantojn? Kaj fine: ĉu ankaŭ amatoroj povas esti kompetentaj instruantoj? Per spertoj kaj konkretaj ideoj Charters montris eblajn vojojn por subteni kaj pliefikigi neprofesian instruadon de Esperanto.

Sian sperton pri la kurso de Esperanto-ĵurnalismo ĉe la Universitato de Zaozhuang prezentis **Alessandra Madella (Italio/Ĉinio)**. Ŝi prezentis sep el siaj studentoj, kiuj, verkante siajn diplomlaboraĵojn, akiris utilajn kompetentojn, kiujn ili povos utiligi en sia posta laboro.

La publikon vigligis **Sabine Trenner (Germanio)**. Respondante al la demando „Ĉu vere eblas lerni lingvon ludante?", Sabine respondis jese, kondiĉe ke oni sciu efike utiligi la potencialon de ludoj en la kurso. Kaj – malgraŭ la lingva celo – oni neniam perdu el la vido la plezuron de ludado.

La lasta, tamen ne malpli grava, prelego estis tiu de **Manirakiza Aime Patrick (Burundo)**: „Esperanto kiel ilo por la integriĝo kaj evoluo de marĝenigitaj popoloj en Burundo”. Esperanto ludas rolon ankaŭ en disvolviĝo kaj agrikulturo, ĉar projektoj financataj de Esperanto-parolantaj organizaĵoj kontribuas al la komunuma disvolviĝo de certaj segmentoj de la burunda loĝantaro. Tiel Esperanto kaj la kontaktoj kreitaj pere de ĝi povas konkrete kontribui al plibonigo de la vivkondiĉoj kaj al la evoluo de lokaj komunumoj.

Gravas aldoni, ke la tuta programo okazis **hibride kaj kun libera aliro**. Tiel la prelegojn sekvis ĉirkaŭ kvindek interesitoj el diversaj partoj de la mondo – de Brazilo kaj Usono, tra Eŭropo, ĝis Irano kaj Barato. Ankaŭ unu el la prelegoj okazis tute distance.

Krome, la programero havis la statuson de **AMO-seminario**, kies celo estas ne nur informi, sed ankaŭ formi kaj aktivigi esperantistojn.

La ĉi-jara Tago de Lernado tiel montris, ke **volontulado, entuziasmo kaj profesieco ne devas esti kontraŭaĵoj**. Male, kiam ili kompletigas unu la alian, ili povas kune kaj sinergie kontribui al pli kvalita kaj efika instruado de Esperanto kaj eble ĝuste tie troviĝas la vojo, pri kiu demandis la titolo de la ĉi-jara programo.

Marija BELOŠEVIĆ, kunordigantino de la Tago de Lernado

Kial oni malavare subtenas ILEI?

Unu kara samideana paro, kiu preferas resti anonima, jam dufoje donacis po 2 000 eŭrojn al ILEI. Tia malavareco kompreneble vekas dankemon, sed ankaŭ naturan scivolemon: kio instigas homojn fari tiel grandajn donacojn al Esperanto-edukado tra ILEI?

Kiam ILEI proponis al ili mallongan anoniman intervjuon por IPR, ili klarigis, ke pro la anonimeco ne facilas fari intervjuon. Tamen ili bonvole respondis per kelkaj mallongaj, sed aparte signifoplenaj frazoj pri sia opinio pri Esperanto-instruado. Jen ilia mesaĝo:

„Laŭ ni, profunda deziro de ĉiu estas povi uzi la denaskan lingvon. Por atingi tion oni urĝe bezonas neŭtralan pontan lingvon, kiel Esperanto.

La vojo tien estas atingi situacion, en kiu estus normale lerni en lernejo ankaŭ Esperanton.

Organizo kiel ILEI, ankoraŭ pli ol UEA, bezonatas por finfine atingi tiun situacion grandskale. Tial ni subtenas ILEI per niaj ĝiroj. Eble ni ĝiros ankaŭ venontjare.”

Tiuj malmultaj frazoj enhavas rimarkinde klaran vizion.

Unue, la geamikoj emfazas la valoron de la denaska lingvo. La celo de internacia komunikado laŭ ili ne devas esti forlasi aŭ malfortigi la proprajn lingvojn. Male, ĉiu homo devus povi konservi kaj uzi sian denaskan lingvon, dum neŭtrala komuna lingvo povus servi kiel ponto inter malsamlingvanoj.

Due, ili vidas Esperanton ne nur kiel lingvon, sed kiel ponton inter lingvaj komunumoj. Por ke tia modelo iam fariĝu grandskala realaĵo, laŭ ili necesas ke Esperanto fariĝu normala parto de edukado: estu tute ordinare lerni ĝin en lernejoj.

Trie, ilia mesaĝo montras, kial ili vidas ILEI kiel aparte gravan organizaĵon. Se Esperanto devas atingi lernejojn kaj lernantojn en multaj landoj, tiam instruado, instruista trejnado kaj edukaj projektoj estas esencaj. Tial ili atribuas al ILEI specialan rolon en la realigo de tiu vizio.

Ilia subteno do ne estas nur financa kontribuo. Ĝi estas ankaŭ esprimo de fido al la graveco de Esperanto-edukado kaj al la laboro de tiuj, kiuj klopodas disvastigi ĝin.

Eble ĝuste tial ilia ekzemplo valoras pli ol nur la sumo de la donacoj. Ĝi memorigas nin, ke la estonteco de Esperanto dependas ne nur de la laboro de organizaĵoj, sed ankaŭ de homoj, kiuj pretas, laŭ siaj eblecoj, subteni komunan celon per sia tempo, laboro, scio aŭ financaj rimedoj.

Kaj eble la plej grava mesaĝo de ĉi tiuj du samideanoj estas tre simpla: se ni volas, ke Esperanto estu vere disponebla al pli multaj homoj, ni devas helpi konstrui la edukajn kondiĉojn, kiuj ebligos tion.

Elkore ni dankas ilin pro ilia duobla granda donaco, pro ilia fido al ILEI kaj, same grave, pro la homa kaj klara vizio, kiun ili dividis kun ni.

Ni esperas, ke ilia ekzemplo ankaŭ instigos aliajn samideanojn demandi sin: kiel mi povas kontribui al la estonteco de Esperanto-edukado?

Ahmad Reza MAMDUHI

Sperto pri efika instruado de triaaĝuloj, precipe rilate al korelativoj

de Petro CHRDLE (chrdle@kava-pech.cz, Ĉeĥio)

Certe ĉiu instruisto de Esperanto scias, ke malgraŭ tio, ke la korelativoj estas bele logika sistemo, malfacilas ilin instrui. Tial mi decidis montri, kiu metodo montriĝis al mi la plej efika dum instruado de triaaĝuloj inter la 69-a kaj 93-a vivo-jaroj, do personoj, kiuj havas fiziologiajn problemojn kun memoro. Kiel 80-jarulo mi vidas tion klare ne nur ĉe mi mem, sed ankaŭ ĉe miaj sam-aĝaj amikoj.

Mi emfazas, ke mi estas nek lingvisto nek pedagogo. Ankaŭ Esperanton mi instruis nur malofte, plejparte nur konversacie dum la internaciaj paroligaj semajnoj, kiujn mi organizis antaŭ jardekoj. Do mia priskribo baziĝas nur sur miaj kursoj por triaaĝuloj. Mi instruis ilin de la komenco ĝis ili (almenaŭ tiuj, kiuj restis) sufiĉe bone regis la lingvon.

Kun la instruado de korelativoj mi komencis tre frue, progresante malrapide, tamen efike:


Mi ne prezentis al ili la konatan tabelon de korelativoj, ĉar tio sendube ŝajnus al ili nekomprenebla, do timiga kaj nelernebla. Mi uzis diagramon (pardonu la ĉeĥan tekston en ĝi, sed certe oni povas anstataŭigi ĝin per ajna lingvo uzata por instruado):

La sinsekvo de la instruado estis jena:

1) Mi disdonis la diagramon kaj klarigis ĝin teorie kun ekzemploj – ne ankoraŭ por instrui la korelativojn, sed nur por montri la logikon.
2) Mi rekomendis, ke oni havu la diagramon antaŭ si kiel helpilon, kaj rigardante ĝin ni ekzercis la demandojn, do k→i→o (u, a, …): *Kio estas tio? Kiu gimnastikas? Kia estas la koloro de la papero?* ktp.
3) Mi demandis, ĉu iu kuraĝas tion provi sen rigardi la diagramon, kaj komencis praktiki nur la unuajn tri finaĵojn.
4) Mi aldonis dum ĉiu sekva leciono pliajn du finaĵojn el la dekstra flanko, ĝis ili kapablis senprobleme uzi ilin, kvankam nur kun la „demandilo” K-.
5) Mi faris la samon kun t→i→o (u, a, e, …), jam iom pli rapide.
6) Mi komencis ŝanĝadi diversajn ki- kaj ti- formojn, kaj la rezulto estis bona (kvankam ne ĉe ĉiuj samrapide).

7) Mi praktikis la samon kun la ceteraj komencoj ĝis n→i→o (u, a, …), ĝis ili kapablis sufiĉe bone regi ĉiujn.

Gravas en tiu sistemo (almenaŭ laŭ mia sperto) dum la ekzercado elekti vortprovizon kiel eble plej simple memoreblan, por ke la lernantoj povu koncentriĝi pri la korelativoj sen devi pensi pri la ceteraj vortoj. Por ĉeĥoj taŭgas vortoj, kiuj estas preskaŭ samaj en la ĉeĥa (papero, krajono, tabulo, lokomotivo, vagono, gimnastiki, …) aŭ kiujn oni povas facile kompreni el tiel nomataj internaciaj vortoj (akvo, lakto, temperaturo, nigra, kanti, …).



Ĉar laŭ mi la korelativoj estas tre bezonataj, mi komencis instrui ilin jam en la dua leciono, apud la lernmaterialo de la uzata lernolibro, senhaste. La progreso estis malrapida, sed konstanta; eĉ du pli ol naŭdekjaruloj, kiuj komence asertis, ke ili neniam memoros tion, post unu jaro sufiĉe bone regis ĉiujn korelativojn.

Pri la lernolibroj: kiel bazon mi uzis la famkonatan lernolibron de Stano Marček *Esperanto per rekta metodo* (la ĉeĥan tradukon de Max Kašparů *Esperanto přímou metodou*), kaj poste pli kompleksan lernolibron verkitan de mi kun mia edzino Stanjo Chrdlová: *Esperanto od A do Z* (*Esperanto de A ĝis Z*), por kiu estas senpage uzeblaj ekzercoj kaj aliaj didaktikaj helpiloj (kvizoj, filmoj ktp.) en la reto. Cetere, la slovaka traduko de Katarina Nosková aperis ĉe la eldonejo Espero de Peter Baláž, mia amiko, kiu mem lernis Esperanton aŭtodidakte laŭ la antaŭa versio de nia lernolibro.

Sub la slogano, ke ripetado estas la patrino de saĝeco, ni trairis la duan lernolibron denove ekde la unua leciono. Kompreneble, tiam ni progresis pli rapide, sed la ripetado de la komenco montriĝis tre utila.


Mi havas sperton kun tiu metodo nur ĉe triaaĝaj lernantoj, sed mi supozas, ke ĝi estas aplikebla senprobleme ankaŭ al lernantoj en aktiva aĝo aŭ al junuloj.

Kio estas tutmonda civitaneco?

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

Tie, kie iu naskiĝas, de tiu ŝtato la bebo ricevas civitanecon. La rajtoj de tiu bebo, de tiu infano, de tiu persono, dependas de la ŝtato, kie li/ŝi naskiĝas. Tamen regas tutmonde la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Daŭre aperas streĉoj inter tiu ligo al la denaska lando kaj tutmonda civitaneco. En la mondo aperas multaj defioj solvendaj, pri ili, kaj la individuoj kaj la ŝtatoj reagas malsame. Tra la Historio homoj evoluis de subuloj al civitanoj.

La nocio de civitaneco staras sur kvar aspektoj:



„Civitanoj estas popolanoj de demokratio, de libera nacio, kiu funkcias laŭ leĝoj bazitaj sur reguloj. Ne troviĝas civitanoj en despotismo.” Xu Zhiyong, ĉino, advokato kaj politika malliberulo.

„Naciismo estas infana malsano. Ĝi estas morbilo de la homaro.” Albert Einstein, germano, fizikisto, mondfederisto.

„Ju pli vi scias pri la mondo, despli vi sentas, ke vi estas parto de ĝi.” Malala Yousafzai, pakistanino, aktivistino pri homaj rajtoj kaj edukado. Ŝi vivas en ekzilo en Britio.

„Ĉiu persono, kiu iras al interstela spaco, provas unue vidi sian propran landon, sed tuj ri konstatas, ke ne estas limoj inter la ŝtatoj, kaj la tuta mondo estas unu familio, kie niaj sortoj estas kunligitaj.” Rakesh Sharma, barata kosmonaŭto.

„Por pluvivi sur tiu planedo kiel specio, ni devos konsideri nin kiel teranojn.” Mae Jemison, usona kosmonaŭtino.



„Iu individuo devas klopodi konscii pri la universalismo, kiu apartenas al ĉies homa vivo.” Frantz Fanon, psikiatro el Martiniko, kontraŭrasisma aktivulo.

„Ni ĉiuj estas mondcivitanoj kaj ni devas zorgi pri la mondo por la generacioj, kiuj venos post ni.” Ban Ki-moon, koreo, eksa ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj.

„Se ni profunde deziras atingi egalecon kaj harmonion inter ĉiuj homoj, ni ne devas maltrafi la momenton de la vivo, kiam la sociaj, idealismaj kaj lingvaj diferencoj, kiuj apartigas la homajn grupojn, ne plu ekzistas.” Maria Montessori, italino, fondintino de la eduka reforma metodo Montessori.

„Neniu homo naskiĝas kun malamo al iu alia homo pro haŭtokoloro, socia deveno aŭ religio. Homoj devas lerni hati, kaj se ili kapablas lerni hati, ili same kapablas lerni ami; amo venas nature en la koron de homoj, ne la malo.” Nelson Mandela, aktivisto kontraŭ rasapartismo kaj unua ŝtatestro en demokratia Sud-Afriko.

En nia instruado ni klopodu malfermi la okulojn, la mensojn kaj la korojn de niaj lernantoj/studentoj kaj ebligi al ili fariĝi veraj tutmondaj civitanoj.

„SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!”[5]

Vidu ankaŭ edukado.net → / Biblioteko / Dosierujo: Koncepto de edukprogramo celanta edukadon al kulturo de paco

Fonto: Demokratio sen limoj. www.democracywithoutborders.org

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Nvard Manveljan, Zhang Yan.
Lerneja: Julián Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Oberrauch, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Stefan MacGill.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny.

[5] Slogano de SAT, kiu aperas sur ĉiu numero de SENNACIULO.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Gong Xiaofeng (Arko), Kimura Goro, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: Katalin Kováts, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontakt-persono: Zsófia Kóródy, *zsofia.korody@esperanto.de.*

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*

TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: Aimé-Patrick Manirakiza. Observanto de TEJO ĉe ILEI: Espoir Kasati.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: Ahmad Reza Mamduhi. Observanto de UEA ĉe ILEI: Gong Xiaofeng (Arko).

LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. Nedeljka Ložajić, *nedeljkalozajic@gmail.com*.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: Zsófia Kóródy.

FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: Ron Glossop, Leysester Miro.

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: Alessandra Madella, *a.madella@tiscali.it*, Didier Janot, *didier.janot@gmail.com,* Emmanuel Desbrières kaj Maximiliano Garcia.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj**: iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatuo en Oceanio. **A-landoj**: ĉiuj landoj escepte de

tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.
Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELJAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, *ilei.kasisto@gmail.com*. Bv klare indiki la celon de via pago.
La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de via sekciestro aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:
a) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.
b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon (aliĝilo: https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).
* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto: dr. MURÁNYI Péter, *HU-9730 Kőszeg, Rákóczi u. 111.*
Teknika helpo: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio.
Redaktoro: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario,*
jozefo.nemeth@gmail.com, tel*: (+36-70) 931-0530.*
Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena POSHIVANA, *olenaposivana@gmail.com*.
La adreso de nia arkivo: *https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php*.
Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aŭgusto 2026,
redaktofino por la sekva numero: la 31-an de oktobro 2026.

Protektado de Esperanto”



